Cyathea dealbata

Arĝenta Filiko

ISSN 1176-418X
6-monata Bulteno de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

Numero 27 Marto 2009

Jarraporto de NZEA por 2008

La jenaj anoj de la estraro de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA) elektiĝis dum la jarkunveno, kiu okazis en Auckland la 20-an de januaro de 2008, kaj daŭris kiel estraranoj dum la tuta jaro :

Prezidanto	David Ryan
Vic-Prezidanto	Chris Krägeloh
Kasisto	Don Rogers
Sekretario	Bradley McDonald
Helpsekretario	Howard Gravatt
Estrarano	Erin McGifford.

La estraro kromelektis Howard Gravatt kiel estraranon (Helpsekretarion) en junio de 2008. Howard jam antaŭe estis estrarano dum multaj jaroj. Estraranoj loĝis en diversaj partoj de Nov-Zelando kaj, pro tio, ili povis raporti kaj priparoli aferojn kun klubanoj en Auckland, Wellington, kaj Christchurch.

Dum la tuta jaro la posteno de unu estrarano vakis. Ne troveblis persono por tiu posteno.

Kunvenoj de la estraro

La estraro kunvenis ses foje dum la jaro, kvar foje telefone, kaj du foje per interreta *Skype*-metodo.

Membraro de NZEA

Je la fino de la financa jaro (30-a de septembro de 2008) NZEA havis 37 membrojn, kompare kun 41 samtempe en 2007, pro la fakto ke ses membroj en 2007 ne remembriĝis. Tamen, kvin

novaj personoj membriĝis. Kvankam novaj membroj ne multis, la aliĝo de iu ajn nova membro estis ĝojinda fakto, tamen, pro la manko da novaj membroj en antaŭaj jaroj. Naŭ aliaj personoj membriĝis ekde la fino de nia financa jaro ĝis la fino de decembro 2008, parte pro la fakto ke NZEA ofertas senpagan gazeton al novaj Esperantistoj, kiuj unuafoje membriĝas en NZEA dum 2008/2009.

Kluboj aktivis dum la jaro en Auckland, Masterton, Wellington, kaj Christchurch.

Dum la Oceania Kongreso en januaro 2008, Jackie Fox iĝis dumviva membro de NZEA, laŭ decido de la estraro, pro 18-jara kontribuo al NZEA, plejparte kiel kasistino.

Estis malĝoje por ni aŭdi pri la morto de dumvivaj membroj, Betty Wyatt kaj Beryl Evans. Lucia Bruce, membro de la Christchurch Esperanto-Societo, ankaŭ forpasis dum la jaro.

Komunikado kaj propagandado

Retpaĝo de NZEA

Don Rogers daŭre ĝisdatigis la retpaĝon de NZEA (www.esperanto.org.nz) kaj ankaŭ renovigis la aspekton de la paĝo. Nia retpaĝo estas grava komunikilo kaj ni ofte ricevas informpetojn per la retadreso, kiu aperas sur la retpaĝo.

Arĝenta Filiko

Arĝenta Filiko, kiun redaktis Chris Krägeloh, eldoniĝis dufoje dum la jaro. *Arĝenta Filiko* estas grava komikilo por niaj membroj, krom pli ĝeneralaj artikoloj aperas en *Esperanto sub la Suda Kruco* (ESK).

Esperanto sub la Suda Kruco

ESK dissendiĝis al membroj de NZEA kaj Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA). En frua 2008 Chris Krägeloh el Auckland kaj Ŝandor Monostori el Aŭstralio transprenis kunredaktan taskon kaj enkondukis grandajn ŝanĝojn al la aspekto al ESK. Kun tiu nova aspekto, ESK estas tre

okulfrapa kaj leginda gazeto, kaj taŭga por sendi al homoj, kiuj petas informojn pri Esperanto. NZEA aĉetis *iMac*-komputilon por Chris por redakti la revuon.

Eroj en televido

Du-minuta ero pri la Oceania Kongreso aperis dum la unua tago de la kongreso en la ĉefa novaĵprogramo de *TVNZ* je la 18-a horo. Ĉi tiu artikolo estis tre favora pri Esperanto kaj plej verŝajne kelkaj centmiloj da nov-zelandanoj vidis la eron.

Bradley McDonald kaj Chris Krägeloh estis intervjuitaj du foje en alia televida programo de *ALT TV* en aprilo kaj majo de 2008.

Leteroj al la redaktoro

Letero verkita per la prezidanto de NZEA aperis en la *Dominion Post* de Wellington la 7-an de januaro de 2008. Alia letero verkita de kimra Esperantisto aperis en la sama tagĵurnalo la 28-an de junio de 2008. La prezidanto sendis leteron por subteni tiun kimran, sed ĝi ne estis presita.

Reklamado en la gazeto de Grey Power

La estraro decidis aperigi kvar reklamojn en nacia gazeto de *Grey Power* (asocio por maljunuloj). Ni konsideris ke, kvankam Esperanto celas al ĉiuj, plej verŝajne maljunuloj estos pli pretaj por lerni Esperanton, ĉar ili eble serĉas novan intereson, ili ĝenerale havas pli da libera tempo, kaj ili eble aŭdis pri Esperanto aŭ eĉ lernis ĝin en lernejo antaŭ jardekoj.

Tri reklamoj aperis ĝis la fino de 2008, kaj proksimume 30 personoj petis informojn al NZEA (per nia senpaga telefon-numero, retpoŝto, aŭ normala poŝto).

Afiŝoj

AEA preparis kelkajn tre belajn kaj okulfrapajn afiŝojn, kiujn NZEA disdonis en bibliotekoj en Auckland kaj en *Victoria* uni-versitato de Wellington.

Senpaga telefonnumero kaj retadreso

Nia senpaga 0800 numero (kiu aperas en nia retpaĝo) daŭre ekredirektiĝis al la domo de la prezidanto. Samtempe, nia retadreso *nzea@esperanto.org.nz* daŭre vojigis mesaĝojn al la prezidanto kaj kasisto. Ĉi tiuj du komunikaj metodoj estas utilaj por nemembroj kaj aliaj personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, kaj dum la jaro ni ricevis diversajn informpetojn, ekzemple:

- petoj pri membreco en Esperanto kaj pri rimedoj por lerni Esperanton
- peto de lernejanino en Whangaparaoa (apud Auckland) kiu volas starigi E-klubon en la lernejo
- petoj pri kontaktdetaloj de kluboj en Nov-Zelando de eksterlandaj Esperantistoj, kiuj intencas viziti.

Rimedoj por lerni Esperanton

NZEA aĉetis pliajn ekzemplerojn de *Poŝamiko* kaj ekzemplerojn de la libro *Esperanto by Direct Method* de Stano Marček. Al kiuj petis informojn (responde al la reklamo en la gazeto de *Grey Power* aŭ ĝeneralaj informpetoj) NZEA sendis ekzemplerojn de tiuj du libroj, membro-aliĝilon, ekzemplerojn de *Esperanto sub la Suda Kruco*, *Arĝenta Filiko* kaj aliaj gazetoj, korespondan kurson de AEA (kun kontakt-detaloj por Nov-Zelando), kaj novan du-paĝan broŝuron *Getting Started in Esperanto*.

Financaj aferoj

En oktobro de 2007, NZEA sendis peton al la *Charities Commission* (instanco pri bonfaraj asocioj) por ke NZEA daŭre estu rekonata kiel bonfara asocio laŭ la nova leĝo *Charities Act 2005*. La instanco finfine informis nin pri la sukceso de nia peto en junio de 2008. Pro tio, NZEA daŭros kiel bonfara asocio kaj ne devos pagi impostojn sur siaj enspezoj.

Dum la jaro, ni reinvestis nian monon je ĝenerale pli altaj interezoj kaj ĉe diversaj financaj kompanioj, por ne riski troan

monon ĉe sama kompanio. Tamen, intertempe interezoj malaltiĝas, kiu plej verŝajne influos nian enspezon por la 2008/2009-a financa jaro.

Oceania Kongreso de 2008

La plej granda sukceso dum la jaro estis la Oceania Kongreso ekde la 14-a ĝis la 23-a de januaro de 2008. Entute 59 personoj partoprenis el Nov-Zelando, Aŭstralio, Japanio, Slovakio, Italio, Francio, Svedio, Malajzio, kaj Nov-Kaledonio.

Surloke en Auckland, la loka kongresa komitato laboris bonege pri la programo, kongresejaj aferoj, kaj eks-kursoj, kaj eĉ preparis specialajn eldonojn de *Arĝenta Filiko*. Eĉ la vetero estis varma kaj sunplena dum preskaŭ la tuta kongreso.

La Oceania Kongreso estis sukceso ĉar ekis propagando por ni en la televido (vidu supre), kaj novaj kaj jam spertaj Esperantistoj en Nov-Zelando uzis la okazon por plibonigi sian scion de Esperanto per kursoj je tri niveloj kaj, plej grave, parolante kun eksterlandaj vizit-antoj.

Somera kurso en Aŭstralio

La estraro de NZEA decidis ne okazigi kongreson en Nov-Zelando en 2009, prefere por subteni la someran kurson de AEA en Sydney en januaro de 2009. la someran kurson ĉeestis 13 membroj de NZEA.

UNANZ

NZEA re-aliĝis en *UNANZ* (asocio de la unuiĝintaj nacioj de Nov-Zelando). Bradley McDonald ĉeestis nacian kon-greson de *UNANZ* en Auckland en majo de 2008 kaj disdonis informbroŝurojn. Bradley elek-tiĝis al la nacia estraro de *UNANZ* kiel reprezentanto de aliĝita membro.

- David Ryan

Kongreso de NZEA en Wellington en januaro de 2010

La estraro decidis ke la venontjara kongreso de NZEA okazos en Wellington en januaro de 2010. Ni decidis okazigi la kongreson post la somera kurso de AEA, kiu okazos en Sydney ekde la 10-a ĝis la 23-a de januaro de 2010. Tiel, membroj de NZEA kaj eksterlandaj vizitantoj al nia mondparto povos ĉeesti la someran kurson kaj, poste, nian kongreson. AEA intencas inviti eksterlandajn instruistojn al la somera kurso, kaj ni eble invitos unu el ili por ĉeesti nian kongreson, por prelegi aŭ instrui.

Poste ni sendos pliajn detalojn sed, intertempe, ni povas informi ke plej verŝajne la kongreso komenciĝos la 24-an de januaro por daŭro de 3-4 tagoj.

Korespondi kun japanaj Esperantistoj

La koresponda servo de *Japana Esperanto-Instituto* peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al:

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokjo, Japanio.

Bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferoj por faciligi la laboron de la koresponda servo.

財団法人 日本エスペラント学会

Komisiitoj de la Nov-Zelanda Esperanto- Asocio por la jaro 2009

Adresaro: Donald Rogers
Arkivo: Erin McGifford
Edukado: Brian Fox
Ekzamenisto ĉefa: Brian Fox
Ekzamenisto vica: **vakas**
Fratuleco: (kunvokanto) Donald Rogers
Hejmpaĝaro ĉe TTT: Donald Rogers, Ross Moore, David Ryan
Libroservo: Donald Rogers
Servo al vizitantoj: Bradley McDonald
Peranto por gazetoj: Dave Dewar
Publikaj rilatoj: David Ryan
Redaktoro de *Arĝenta Filiko*: Christian Krägeloh
Kun-redaktoro de *Esperanto Sub la Suda Kruco*: Christian Krägeloh
Scienco: Donald Rogers
Strategia plano: la estraro
UEA ĉefdelegito: Dave Dewar
UEA observanto: Bradley McDonald
UNANZ reprezentanto: Bradley McDonald

Pri *Arĝenta Filiko*, bonvolu kontakti la redaktoron:
chris.krageloh@aut.ac.nz

Poŝtadreso de NZEA:
PO Box 8140
Symonds St, Auckland 1150, NZ